

JEN



—Jen la fama Venko de Samotraso.

—Venko, kaj havas nek kapon, nek brakojn? Ja plaĉus al mi, vidi en kia stato troviĝas la Malvenko!

LIBREJO

HACHETTE & Kio

79, BOULEVARD SAINT-GERMAIN, PARIS

NE ESTAS PLU MISTEROJ EN LA MONDO, DE KIAM ONI
POVAS AĈETI PER 2 FRANKOJ, ĈU ĈE HACHETTE MEM,
ĈU ĈE J. ROSALS (*str. Portaferrisa, 30, Barcelono*), LA

MISTERO DE DOLORO'n

DE

ADRIÀ GUAL

TRADUKITAN DE FRED. PUJULÀ

Neniu malbona esperantisto legas la

"FRANCA ESPERANTISTO," n,

KIUN ONI ABONAS EN

46, BOULEVARD MAGENTA, PARIS

Skribmaŝino "OLIVER,"

La plej fortika el la mondo. Oni uzis ĝin, kiel bombardilon dum la milito rus-japana. Facile uzebla. Ebligas la skribadon, eĉ al la mal-
kleruloj, kiuj ne scias legi.

JEN

LETERO, de kataluno al franco

Barcelono, Julio, 1909.

Sinjoro M. Dupont:

Kara samideano: Mi ne scias kiel danki la elpensinon de la Jarlibro, en kiu mi trovis vian adreson kaj nomon. Vere, Esperanto estas mirinda afero. Kiama-niere, sen ĝi, vi — spicisto de la strato Vavin de Parizo —, kaj mi ŝufaristo de la strato Boqueria de Barcelono, — ni povus fariĝi amikoj kaj interŝanĝi niajn profundajn ideojn?

Vian lastan leteron mi ricevis hieraŭ per la vespera kuriero. Mi estas preta aprobi vian indignon pri la nova verko de sinjorino Kolowrat, el kiu vi konfesas nenion kompreni, kaj el kiu, mi estas certa, mi ankaŭ komprenos nenion. Certe, la titolo mem jam estas stranga kaj ne algusta; sed de post multe da tempo, mi jam ne miras pro tio. Mi memoras esti vidinta pentraĵon kun la titolo «Simfonio de koloroj» kaj skulpajon titolitan «Epilogo», kvankam tiuj titoloj multe pli rilatas al la muziko kaj al la literaturo, ol al la penikoj kaj al la ĉiziloj. Mi tute ne miras do, ke dramo portas la nomon de «Portreto». Pli grandajn kontraŭsencaĵojn ni vidos, se Dio (Laŭdata Li estu) favoras longe nian vivon.

Mi gratulas vin, ke la prezo de la ŝinkaĵoj plialtiĝis; sed mi esperas, ke tiu plialtiĝo de la prezo de l' besta viando, ne plikarigos ankaŭ la ledojn, kiuj entenas ĝin; sen tio, ni ŝufaristoj dancos malgajan dancon.

Antaŭ du tagoj, mi vidis sinjoron Puig, kiu estas fabrikisto de ĉapeloj. Ni ambaŭ estas tre intimaj, kvankam niaj metioj atentis tre kontraŭajn ekstremaĵojn de la homa korpo. Nia amikeco venas de tio, ke li havas tre dolorsentajn piedojn, kaj nur mi trafas fari al li delikatajn ŝuojn. Lia fabrikejo fariĝis fama en la lando, de kiam konata eminentulo aĉetadas ĉe li ĉiun ĉapelon. Popolo inklinis kredi, ke la scienco de la grava scienculo, venas al li de liaj kapkovriloj. Tia sperto konsilis min, rifuzi fari botojn al iu tre konata, kiel malbona verkisto. Mi timis senkreditigi mian butikon, aŭdinte ke tiu verkisto verkas kvazaŭ per la piedoj.

Sinjoro Puig kaj mi, ni parolis pri tiu ĵus aperinta gazeto «JEN». Ĉu vi vidis ĝin? Jen ankoraŭ superhomoj, kiuj pensas mirigi nin per siaj nefinitaj desegnaĵoj. Ja mi diras al vi, ke oni frezeziĝus, se oni tro atentus la modernajn inklinojn de la artistoj. En nia tempo, oni estis pli saĝa kaj pli respektoplena por la klasikuloj. Nun ĉiu junulo havas en la korpo reĝon da malmodes-teco. Sed agu kiel mi: tio ne povas daŭri; la vero fine trudiĝos; restu malantaŭ via kontoro, ĝuante la trankvilon de la hejma laborado!

Mi multe dezirus havi kiel klienton, iun fremdan konatan samideanon. Sinjoro Puig donis al mi la adreson de sinjoro Bec Auer el Tirol; sed per lastaj informoj mi scias, ke tiu sinjoro kutimas iri piednuda kaj eĉ genunuda. Mi ne komprenas, kiel kun neŝirmataj piedoj oni kuraĝas trairi iajn dornoplenajn vojojn.

Mi sciigas vin, ke mi ĵus fondis novan esperantistan grupon, kun la nomo «Fiereco kaj Tranĉileco». Ĝis nun, la membroj ne estas multenombraj; krom mia edzino kaj miaj gefiloj, nur sinjoro Puig aliĝis. Ni akceptis lin pro simpatio, kvankam li ne apartenas al nia metio. Oni honoris min, nomante min Prezidanton, kaj mi esperas, ke mi scios esti inda de mia ofico. La nomo de nia societo montras, ke ni estos akraj kiel niaj laboriloj, kaj fieraj por defendi la bonajn principajn de la ĝenerala Arto kaj de la speciala arto de la ŝufarado. Aliflanke, mi estis devigata elekti nomon, ĉar ĉi tie ne sufiĉas la simpla nomo «Grupo». Ni ankaŭ jam havas, kiel ĉiu grupo, standardon kaj stampilon. Ni certe sukcesos. Hieraŭ ni faris kunvenon post la vespermanĝo. La tuta programo konsistis el kantoj. Mia filino Rozo kantis arion kun poeziaĵo el la Krestomatia. Sed ni devis forlasi la duonon de la programo, ĉar mia edzino, kiu multe klopodis dum la tago, estis iom dormema. La venontan semajnon, ni daŭrigos la interrompitan kanton.

Mi dezirus interŝanĝi poŝtkartojn kun japana esperantisto. Ĉu vi ne povos havigi al mi adreson el Tokio aŭ Kalkuto? Sed volu bone elekti la korespondanton, por ke ne okazu al mi, kio okazas al amiko ci tiea, kiu ĉiam sendas kartojn kun vidaĵoj al japano, kaj anstataŭ respondaj kartoj, li nur ricevas skatolojn da teo. Tio estas ĝentilaĵo, kiu multe pli valoras ol karto, sed mia amiko abomenas la teon, kaj li pli preferus ricevi «kimonon» kiel ni vidis iam al aktorino Sada Jako.

Mi esperas trovi en via respondo sciigojn pri la bonfarto de via edzino. Mi bedaŭras, ke mi ne povas plifruigi mian vojaĝon al Parizo, por ĉeesti la bapton de via filineto. La proksima Kongreso retenas min ĉi tie.

Via sincere,

PAU BALDRUCH.



Kiel insiste rigardas min la grafido!... Sem povus pensi ion por rigiti!.....





KONSEKVENCO

- Kial vi, kiu tiom multe da vino trinkas, abonenas la vinberojn ?
—Pro medicina teorio. Mi neniam kredis pri la efikeco de la piloloj.

Sinjoro G. Chavet lasis kreski sian barbon.
(La ĵurnaloj).



ana

Neesperantisto: - Mi nescias kial, ĉiu pasanto diras ke mi similas sinjoron Chavet!




apa

-Kiom da fratoj vi havas?
-Du.
-Kiel tio povas esti ebla? Via patro ja diris al mi, ke li havas tri filojn!



Jen: la dividado de la laboro.



LA EDZO, SIN ĴETANTE POST LA SIN MEMMORTIGANTA EDZINO.

-Jam mi tenas ŝin; ŝi estas savita.

La fonografo de sinjoro Sabadell.



PERSONOJN ofte oni renkontas, kiuj havas kronikan kataron; aliajn, kiuj havas kronikan hemikranion. Sinjoro Sabadell havas kronikan fonografon. Li amas tiun aparaton, pli ol infano amas sian ludilon, Sinjoro Sabadell estas kapabla suferi ĉiun doloron kun plej granda trankvileco. Li povas suferi stoike, ke oni amputu al li la kruron de la najbaro. Sed li ne povus elporti atencon kontraŭ sia fonografo.

Dum la alkongresaj vojaĝoj, kiam ni, transmigrantaj esperantistoj koleris ĉiufoje, trapasinte doganon, li rigardas kun apostola rideto la elserĉadon de la doganistoj. Dum ili elmiksas ĉion malsupre-supren, sinjoro Sabadell ne perdas la trankvilecon, kaj eĉ kuragaŝ alparoli ilin en Esperanto. Sed kiam, okaze, la doganisto aldirektas la manon al la ingo de la fonografo kun la rulkliŝoj, tiam la vizaĝo de sinjoro Sabadell fariĝas pala, lia korpo indigne tremetas, kaj per plej natura lingvo, li admonas la oficiston.

Antaŭ kelkaj semajnoj, la kongresa Komitato kunvenis, kiel ĉiun merkredon de post la monato Novembro. Oni estis fininta la laboron, kaj la interparolado fariĝis ĝenerala. Sinjoro Sabadell sciigis la kunkomitatojn, ke li havas fonografon, esperantistan fonografon. La sidanta, silentema en angulo, Sinjoro Claramunt kunrulis cigaredon.

— Jes, amikoj — diris Sabadell — mia fonografo, ne estas simpla, vulgara fonografo, sed samideana fonografo. Ĉiu miris. Li daŭris.

— Mi kunportis ĝin al ĉiu kongreso kaj mi la rulkliŝojn impresigis, de ĉiu fame konata esperantisto. Kiam vi venos hejmen, mi povos regali vin per agrablaj rememoroj. Mi havas la voĉon de sinjoro Boirac, la voĉon de sinjorino Junck, la voĉon de Berthelot, la voĉon de Mudie, la voĉon de Reicher, la voĉon de la Prezidanto de la Pariza Grupo, la voĉon de de Ménil, la voĉon de

Sinjoro Sabadell ankoraŭ daŭrus, se Claramunt ne interrompus lin:

— Kara Vicprezidanto, ĉu vi ne havas, okaze, la «Voĉon de Kuracistoj?»



— Kien vi iras tiel rapide, vi, al kiu tiel multe plaĉas sidi?
— Mi iras aĉeti seĝon.



— Mi fine renkontas vin, kanajlon, kiu uzas mian [fabrikmarkon]!

— Sed vi devus danki la reklamon! Ĉu mi ne vendas la produktaĵojn, pli malkare ol vi?

Ekriculoj.



ONI bezonas veturilon, ĉu luitan ĉu privatan, kiam oni loĝas grandan urbon. Kiam oni estas riĉa, oni bezonas privatan veturilon. Tion komprenis gesinjoroj Melis, malnovaj ŝpinistoj, nun fabrikistoj de tiksaĵoj en Barcelono. Kaj ili aĉetis al si elegantan kupeon.

De tiam, en ilia konversacio, miksiĝas ofte, tro ofte, la jenaj frazoj: «Kiam ni iris hieraŭ per nia veturilo...» «Mi povas pruntedoni al vian veturilon» «Kiom multe kostas, havi veturilon!»

Antaŭ kelkaj tagoj, gesinjoroj Melis kaj iliaj du filinoj ĉeestis balon en eleganta domo, kie oni festis la XXII^{an} datrevenon de la elpenso de nia lingvo, kaj kien ili iris komforte per sia veturilo. Oni dancis *La Rondon*, kaj rigodonojn, kaj valsojn. Dum la fraŭlinoj dancadis, la sinjorinoj babladis en angulo, atentante ĉiam la robojn de siaj filinoj. Ankoraŭ valson. La horoj pasas dolĉe. Sinjorino Melis vokas siajn filinojn:

— Ni iru karegaj; estas tre malfrue.

— Ankoraŭ unu momenton, patrineto, — respondis ili per plej milda voĉo. Sinjorino Melis konsentis, kaj fraŭlinoj Melis malaperis tra la svarmo de la salono. Post duono da horo, nova voko.

— Ni iru miaj karaj, vere estas tro malfrue.

— Ĉu vi pensas?

— Jes, kaj la veturigisto certe senpacienciĝas!



— Li montris al mi la subskribon de Ĉefeĉ.

— Sur ĉeko de la Ĉekbanko?

— Ne, karulino, li estas tro avara; sur ŝlosilo!

Posedanto de domo

Posedanto de domo. — (Trinkante ĉokoladon kaj legante la ĵurnalon «Propraĵo») Ĉu estas vi, kiu deziras lui la trian etaĝon de mia domo?

Loĝaspiranto. — Jes sinjoro.

P. — Aha! (Vokante) Edzino, filoj, venu... tiu ĉi sinjoro deziras lui la trian etaĝon. (La familio ĉirkaŭas la nekonaton kun granda scivolemo miksitaj kun iom da kompatoj). Bone; nun, vidinte lin, foriru ĉar ni ambaŭ devas interparoladi. Fermu la pordon.

L. — (Timigita). Mi tute ne deziras ĝeni vin... Se vi estas okupata, mi ja povos reveni.

P. — Tute ne, sinjoro, tute ne; preferinde estas aranĝi la aferon tuj. (Rigardante lin). La aspekto ne estas malbona; la okuloj estas beletaj, kaj lia voĉo — agrabla...

L. — (Rugiginte kaj ĝenata). La servistino, kiu montris al mi la etaĝon, diris, ke vi volas esti pagata po 22 duroj ĉiu monate...

P. — Atendu, sinjoro, atendu! Ne tiel rapidu! Ni ankoraŭ ne alvenis al tio. — Kiom da jaroj vi havas? Kiel vi estas nomata?

L. — Mi estas nomata Narcis Campmany.

P. — Moŝto Narcis DE Campmany?

L. — Sen DE.

P. — Estas bedaŭrinde. Se vi luprenos la etaĝon, estos necese, ke vi aldonu al via nomo DE. En la dua etaĝo mi havas baronon, kaj tio pligravigas la domon. — Daŭrigu, sinjoro DE Campmany.

L. — Mi estas tridekjara kaj fraŭlo.

P. — Bone! Tio plaĉas al mi. Fraŭlo, precipe kiam ne estas diboĉa, estas pli bona ol edzigito, ĉar infanoj tro uzas la kaĥelojn kaj malpurigas la murpaperon. — Kiel vi fartas?

L. — Tre bone, dankon. Iom da varmo!

P. — Ne, vi ne komprenas min; mi deziras informiĝi pri via sano. Kian temperamenton vi havas?

L. — Limfan, mi kredas... jes, limfan.


P. — Ni vidu; formetu la redingoton.

L. — Nu! Kion...!

P. — Jes, sinjoro; faru, kion mi petis... tio estas tre grava por mi. Nu, mi ne volas havi ĉe mi malsanemulojn. Nenio pli diskreditigas bienon, ol tro ofte vidi antaŭ la pordo la veturilon de la mortintoj... Mi volas



LA SUPERSTIĈA PORKO



—Aha! Eleganta sinjoro tra ĉi tiu kvartalo? Tio vokas bonan sorton!

loĝantojn fortikajn, kun alta brusto... Nu, formetu la redingoton.

L. — (Hezitante). Sinjoro...

P. — Tre bone!... Nun, la alian manikon. Hum! Mi pensis, ke vi estas pli fortika. Certe vi pezas tre mal multe!

L. — Mi ne scias.

P. — Vi havas tre mallongan kolon.

L. — Ŝajnas al mi, ke ne.

P. — Mi diras al vi, ke jes! Kaj tiuj vejnoj... malbona afero... atentu la apopleksion!

L. — Sed sinjoro...!

P. — Estas necese, ke vi promesu ĵure, ke vi refreŝigos la sangojn ĉe la komenco de ĉiu sezono. Mi zorgos montri al vi la plej bonan refreŝigilon.

L. — Ĉu mi povas revesti la redingoton?

P. — Atendu sinjoro. Vi ne faras sufiĉe da ekzercoj.

L. — Jes sinjoro; matenmanĝinte, mi iras ĉiutage ĝis la ekstremaĵo de la ĝeto.

P. — Ne sufiĉas: de nun, vi vojaĝos trimonatojn ĉiujare. Tio pligravigas la domon kaj ripozigas la ŝtuparon. Ĉiu loĝanto de la domo vojaĝas aŭtune.

L. — Do, ni diris ke la prezo estas 22 duroj ĉiunonate...?

P. — Ne, ne, ne, ne, ne. Ni ankoraŭ ne alvenis ĉi tien, sinjoro DE Campmany.

L. — Ŝajnas al mi, ke...

P. — Kio ŝajnas al vi? Vi ridigas min sinjoro. Ĉu vi kredas, ke oni ludonas apartamenton simple, kiel oni vendas pantalonon? Ja mi diras al vi, ke la nunaj luprenantoj kondukas kun ni kun tia senĝeno...! Kial vi ne petas tuj de mi la ŝlosilojn de la apartamento? Vi jam volas pritrakti la luprezon, kaj ankoraŭ vi ne konas la kondiĉojn de la luo.

L. — De nun mi akceptas ĉiun kondiĉon, ĉar mi supozas, ke ili estos konvenaj.

P. — (Eltirante paperon el la poŝo). Aŭdu:

Regulo 1.^a La loĝanto kaj lia familio vekigōs kaj kuŝigōs je la sama horo, kiel la mastro de la domo, ĉar tiu ĉi loĝas en la suba apartamento, kaj ne volas esti ĝenata per la bruo.

Regulo 2.^a La loĝanto estas devigata eliri ĉiutage du fojojn sur la balkonon, frotante siajn manojn kun kontentega nieno, por enviigi la promenantojn, kaj pli-grandigi la gravecon de la domo.

Regulo 3.^a Se la loĝanto ne konas la damludon, li lernos, por ludi kun la posedanto de la domo la vesperojn de li elektitajn.

Regulo 4.^a La prezo de la luo estas: 22 duroj ĉiumonate, pagitaj poĵare, kaj ĉe la komenco de la jaro. Kiam la imposto de la bieno estos pligrandigita, la loĝantos devos pagi unu peseton plian por ĉiu plia kvin-solda monero de la imposto.

L. — Ĉu estas nenio plu?

P. — Restas ankoraŭ kelkaj reguloj malpli gravaj, kiujn mi montros al vi ĝustatempe.

L. — Ŝajnas al mi tre bone. Mi kredas, ke ni interkonsentos.

P. — Ĉu vi estas poeto?

L. — Jes sinjoro; ofte mi amuziĝas farante versojn, kaj multaj publikiĝis.

P. — (Kontenta). Ĉu — subtenanto de la Floraj Ludoj?

L. — Ne sinjoro.

P. — Mi bedaŭras! Vi devos klopodi fariĝi tia. Mia edzino deziregas okupi la lokon de Clemencia Isaura.

L. — Mi klopodos kiel eble.

P. — Tre bone; mirinde!

L. — Nu, estas interkonsetite, ĉu ne? 22 durojn ĉiumonate...?

P. — Pardonu; ankoraŭ mankas demando.

L. — Kiu?

P. — Vi forgesis diri al mi, kial vi forlasas la apartamenton, kiun vi nun okupas.

L. — Ho, pro bagatelo; mi havis malgrandan diskuteton kun la mastro de la domo, kaj mi ĵetis lin tra la fenestro.

C. M.

(El *Un tros de paper*. Komencon de la pasinta jarcento.)




—La socia demando?... Nu! Unuj kondukas la ĉaron; aliaj veturas en ĝi; ĉiu plendas, kaj neniu pensas pri la ĉevaloj.

—Sed, kiuj estas la ĉevalo, en la socio?

—Ni!

—Parolu en ununombro, mia kara!

—Vi, dol!



— Amindumi min! For de ĉi tie! De nun, la pordo de mia hejmo havos por vi ŝlosilon!
— ... de sinjoro Ĉefĉe?

*Ydora
Faria***TEATRA TUALETO**

—Via ĉapelo, sinjorino, malebligos la vidadon al la malantaŭaj najbaroj.
—Ne grave. Oni ludas pantomimon. Ili ja ankaŭ ne aŭdos!

AVA HUMORO

KLASIKA SPRITAĴO



Duko Frederiko de Urbi. — Mi nescias, kion fari kun tiu granda kvanto da tero, kiun oni elkavis por fosi la fundamentojn de la palaco.

La Pastro. — Sinjoro; mi havas bonegan ideon: oni faru grandan fosaĵon kaj oni enjetu tien ĝin.

Duko Frederiko de Urbi. — Sed kien ni metos la teron, kiun oni eltiros el la fosaĵo?

La Pastro. — Oni faru la fosaĵon tiel granda, ke ĝi povu enteni la teron de la fosaĵo mem, kaj tiun de la kastela fundamento.

(El la *Libro de l' Cortegiano*. — B. Castiglione, L, II).



Korespondado

Sinjoro K. A., Via *soneto*, konsistanta el 20 versoj, estas ĉio, kion vi volos, escepte soneto. Ĉu vi ne scias, ke soneto estas poeziaĵo konsistanta el 18 versoj?. — *S.° B. N.*, Tro funebra via ŝerco. — *Fino X.*, Kial vi ne sendis ĝin al la Floraj Ludoj? Ni certigas al vi bukedon da naturoj fruktoj. — *Doktoro Flava*, Bonega, via *sekreto*. Ni profitos ĝin. — *Karulo*, Ne sinjoro, vi eraras. Ni ĵetas vian artikoleon en la paperkorbon. Nia gazeto neniam enhavos iun ajn atakon kontraŭ esperantistoj. Vi ne bone komprenas la sencon de la vorto ironio. — *Jaume Prats*, Same, kiel al *Karulo*. Ne forgesu, ke nia rondo estas amika rondo. Kiam oni ridas, oni povas montri la dentojn, sed oni ne devas mordi. — *Sam Ulo*, Dankon pro via leĝendo. Ĝi estas tre sprita, sed ni rimarkigas al vi, ke ĝi okupos du paĝojn! Ĉu vi ne povus sendi al ni artikolegon de unu aŭ du linioj?

LA SEKRETARIO.

NE ABONU LA GAZETON

Unu jaro. 3 Fr. (1,200 sm.)
 Jarduono. 2 » (0,800 sm.)

JEN

Plumdirektoro: Fred. Pujulà. Krajondirektoro: Apa.

Eldonisto: RAMON FARRÉ. str. Portaferrixa, 17, BARCELONO. (Li petas, oni faru la pagon per la «ĈEBANKO ESPERANTISTA» Merton Abbey. LONDON SW.)

REPREZANTOJ.

- G. Warnier, «Librairie de l'Esperanto» 15, rue Montmartre, Parizo.
- Möller & Borel, «Esperanto Verlag» 18/19, Lindenstr. BERLINO SW.
- Andr. Fred. Host & Son, Kg. L. Hofboghandel. Bredgade, 35, KJOBENHAVN.
- «The British Esperanto Association» Museum Station Buildings, 133-6, High Holborn, LONDON. WC.
- Libroeldonejo «Esperanto» — Valovaia, kv. 5.—MOSKA.

NE ABONU ANKAŬ



PAPITU'n

Kataluna satira karikaturo gazeto.
Aperas ĉiusemajne.



ABONO :

Hispanlando: jaskoarono. 2 Ptoj.

Kesulando: 3 >

PELAYO, 35 - BARCELONO

NE MENDU AL LA FIRMO

“WARNIER

15, RUE DE MONTMARTRE, PARIS“



la “GRAFO ERARINTA“ kaj la “NAIVULO'n“

de Fred. Pujulà y Vallès kun desegnaĵoj de Torné-Esquius

Legante tiujn librojn, kiuj nur kostas 20 sp. vi estus kaptata de rida malsano

ABONU

“LINGVO INTERNACIA,,’N

33, Rue Lacépède, PARIS

NENIAM ONI VIDIS TIUN GAZETON EN LA MANOJ DE SENBRAKULO

“ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL,,

LINDENSTR. 18/19. BERLIN. SW.

La “Esperanta Biblioteko Internacia,,

ELDONATA DE TIU FIRMO, ESTAS LA PLEJ MALKARA

0,10 SM. LA LIBRETO

The British Esperantist

Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio

Adreso: Museum Station Buildings, 133/136, High-Holborn. - LONDON W. C. 1,50. Sm. jare



La Korvo.—Kisoj? Ĉirkaŭprenoj?... Ili pretigas, eble, mian manĝotablon.